Aŭstria Esperantisto

Oficiala organo de Aŭstruja Esperanto-Delegitaro (A. E. D.), Esperanto-Delegitaro de Wien (E. D. W.) kaj Universala Esperantista Pacifista Ligo (U. E. P. L.)

2ª jaro. No. 7 **Monata** **Julio 1925**

Redaktejo kaj administrejo: Korneuburg ĉe Wien, Hovengasse 12, II, 13

Kunlaborantoj! Skribu legeble, retenu kopion, aktualaĵojn sendu ĝis la 1ª de l' monato. Manuskriptoj ne resendataj.

Jarabono: Por Aŭstrianoj aŭ. S 3, Germanoj g. or. M 2, Alilandanoj sv. fr. 3.50

BADEN ĈE WIEN.

Orig. art. de Österr. Verkehrswerbungsgesellschaft por „A. E."

Proksime ĉe Wien — atingebla per Südbahn (t. e. suda fervojo) aŭ per elektra rapidfervojo en apenaŭ unu horo — situas „Baden bei Wien", la plej malnova banloko de Aŭstrio.



Ĉirkaŭate de malhele verdaj arbaroj kaj belegaj vinberejoj kaj tamen en plej intima interligiteco kun la ĉefurbo, kies kultura graveco ĉiam influas la karakteron de l' banurbo, Baden montras bildon de grandurba vivo en tute kampara ĉirkaŭaĵo. Baden estas somera restadejo de multnombraj eminentuloj. La favoro de naturo kaj la kultura valoro kreis ĉi tie centron de societa vivo, kio sole ebligis la plenutiligon de la plej granda riĉaĵo de Baden, nome la jam al la Romanoj konataj kaj de ili volonte vizititaj mineralakvaj fontoj kaj ilian uzadon por bonfarto homa.

Dek tri varmegaj sulfurfontoj, kies efiko estas ege pliintensigata de altgrada radio-aktiveco, venas el la tero en la banurbo. Per impona aro de mo-

dernaj instalajoj oni sukcesis, uzi la varman mineralakvon por banado je temperaturo de 22—36° C sen perdo de iuj ajn elementoj.

La saniga efiko de la banoj, kiuj alportas resaniĝon al la homoj aŭ almenaŭ mildigas diversajn malsanojn, estas certigata per kelkjarcenta praktiko.

Restado en Baden komprenigas la multindikan frekventnombron, kiu ekzemple estis en la jaro 1922: bangastoj 41.000 kaj turistoj 800.000. Kompreneble multnombraj Aŭstrianoj vizitas Baden. Sed la bangastlisto ankaŭ enhavas nomojn de gegastoj el ĉiuj landoj de l' mondo.

Krom la jam menciitaj banejoj modernaj sanigejoj estas je dispono de la bangastoj.

Ĉarma estas la aspekto de la urbo kun la palacosimila „Kursalon“ (amuzejo), la urba teatro, granda nombro da plej bone instalitaj hoteloj kaj pensionoj kaj granda vico da burĝaj gastejoj.

Esp.-igis Math. Altrichter-Korneuburg.

PARTOPRENO DE AŬSTRIO JE „DEUTSCHE VERKEHRSAUSSTELLUNG“ (t. e. „GERMANA EKSPOZICIO PRI TRAFIKO“) EN MÜNCHEN.

„Gazetservo de l' generaldirekcio de Aŭstriaj liglandaj fervojoj“ sendis al ni jenan orig. artikolon:

La 30. majo 1925 „Deutsche Verkehrsausstellung“ en München estis inaŭgurata de la ŝtatsekretario R. von Frank.

„Trafiko“ estas kadra vorto, kiu entenas la plej ampleksajn teknikajn temojn; ĝi estas la ponto, kiun nia tuta mastrumado surpaŝas kaj kiu malfermas al ni ĉiujn belajojn de la mondo!

La ega pligrandiĝo de la trafiko en la lastaj jardekoj kaŭzis grandegan pliampleksigon kaj perfektigon de la transportiloj koncerne la uzatajn fortojn kaj la konstrumanierojn.

En la trafiko sur fervojoj la vaporlokomotivo transformiĝis per akomodiĝo al la plej novaj sciencaj ekkonoj, al la konataj fieraj produktoj je forto kaj rapideco, kiuj efektivigas la trafikon sur la reloj en fidinda maniero. Krome la elektra lokomotivo aperis en multspeca konstrumaniero kaj forto, por sendependigi nin de la eksterlandaj karbominejoj, kiujn oni forprenis de ni sekve de la milito.

La konstruo de la vagonoj estis akomodata al la postuloj pri rapideco kaj transportado de amasoŝarĝoj.

Samtempe kun la transportiloj evoluiĝis la certig-instalajoj kontraŭ akcidentoj konforme al la grandegaj postuloj, kiujn densa kaj rapida interkomunikado necesigas.

Per helpo de blokadaparato unu viro regas vastajn stacioinstalajojn kaj la alligitajn liniojn. Kune kun tio ekestiĝis la modernaj interkomprenigiloj, telegrafo kaj telefono.

La ĉiam pligrandiĝanta aksopremo

de la lokomotivoj kaŭzis novajn formojn de la relfundamento. Relsubmetajoj, reloj kaj fiksiloj laŭiĝis al la grandaj fortoj kaj certigis la senskuan kaj sendanĝeran veturadon de la trajnoj.

Vastaj modernaj instalajoj je laborejoj kaj funkciigejoj estiĝis por la revizado kaj riparado de la difektitaj respektive por la pretigo kaj depono de la uzeblaj transportiloj. Tiuj ĉi same kiel la novaj stacioinstalajoj kaj loĝdomoj por la dungitoj ricevis formojn, kiuj konformas al la teknikaj bezonoj kaj al la konstrustilo regionkutima.

Imponaj konstruajoj ekestas en la proksimaj alpovaloj, por devigi la akvofortojn en la servon por la trafiko.

La trafikekspozicio en München nun donas en klara kaj kompreniga maniero el ĉiuj fakoj de l' fervojfunkcio abundon da prezentajoj, kiuj same al neprofesiulo kiel ankaŭ al fakulo peras klarkomprenon kaj kontentigon.

Kompleta miniatura fervojo por persontransporto kun ĉiuj necesaj instalajoj prezentata funkciante, modeloj, aparatoj, unuopaj partoj, ilustrajoj ktp. ebligas al ĉiu vizitanto en mallonga tempo profunden eniĝi en la agadon ĉe la fervojo.

Apud „Deutsche Reichsbahn" (t. e. „Germana regna fervojo") ankaŭ la „Aŭstriaj liglandaj fervojoj" ekspoziciis en ejo 11 de la granda halo I kaj tie montris en facile komprenebla maniero la tutan funkciadon kaj la administradon de tiuj ĉi fervojoj.

La eniranton salutas granda oleopentrajo de Gustav Jahn: „Alpa knabino sur altsitua montherbejo inter florantaj alporozoj; malantaŭe la neĝokovrata Rax-monto." Ĉe ambaŭ flankoj troviĝas 6 bildoj, montrantaj popolkutimojn en la aŭstria alporegiono, kreitaj de la sama artisto. La ejo estas disponigita al la propagandservo por interesigi fremdulojn. Kontraŭflanke estas videbla reliefo de Spuller-lago kun la elektroproduktejo por Arlberg-fervojo; bildoj de la elektrigitaj linioj; modelo de „Roth-Wagner-ponto"; modelo de la stacioparto por komercajoj en Linz; blokad- kaj telefoninstalajoj, mezuraparatoj kiel ankaŭ bildoj pri ĉiuj fakoj de l' funkciado kaj administrado, kiuj ebligas profundan komprenon de la frekvento kaj laborado ĉe la aŭstriaj liglandaj fervojoj.

Krome rimarkinda estas valora kronologia prezentajo pri la evoluiĝo de la aŭstria lokomotivo por rapidtrajnoj kaj kolekto de ĉiuj lokomotivoj konstruitaj de Sektionschef d-ro h. c. Gölsdorf.

En la granda halo de la suda parko estas ekspoziciataj kvar lokomotivoj por normala reldistanco.

Tri inter ili konstruitaj laŭ pli malnova maniero estas eksfunkciigitaj, nome:

2 C varmegvapora lokomotivo montetara por rapidtrajnoj, serio 409, kun du egalpremaj laborcilindroj, ventilreguligo laŭ Lentz, ŝanĝkonstruita en la jaro 1924 el la normalvapora lokomotivo kun du interne lokitaj cilindroj, el kiuj nur unu ricevas la altekspansian vaporon, serio 9. — F Dentrada tendrolokomotivo, serio 269, sistemo Abt, kun du egalpremaj laborcilindroj por la fervojlinio Eisenerz-Vordernberg. Por pli bona rigardeblo la dentradveturigstablo estas elprenita. — 1 F varmegvapora lokomotivo montegara por rapidtrajnoj, serio 100, kun kvar cilindroj, el kiuj du ricevas senpere el la bolilo la altekspansian vaporon, kaj kun antaŭvarmigilo por la funkciiga akvo, konstruspeco „Dabeg". — La kvara estas la plej moderna varmegvapora lokomotivo por rapidtrajnoj, serio 113, kun du egalpremaj cilindroj, ventilreguligo laŭ Lentz kaj antaŭvarmigilo por la funkciiga akvo laŭ Dabeg.

Sur la relparoj kuu 75 cm reldistanco oni ekspozis elektran lokomotivon, serio E 2, po unu salon-, person-kaj ŝarĝvagonon de la Mariazell-a fervojo.

La aranĝo kaj instalo de la ekspozajo estis fiditaj al direktoro inĝ. Karl Kontrus. Esp.-igis H. Steiner.

ĈU VI ANKORAŬ NE SENTAS

la devon energie varbi por „A. E." aŭdinte, ke la redakcio malgraŭ trifoja ? plialtiĝo de la preskostoj (la lasta nun je 12%) ne altigis la abonpagon?

La venonta numero (aŭg.-sept.) □ aperos meze de septembro. □

LASTA ALVOKO AL Va TUTAŬSTRIA ESPERANTO-KONGRESO.



Katedralo en Salzburg.

La tempo jam urĝas. sed multaj aŭstriaj samideanoj ankoraŭ ne anoncis sin. La plej esencaj preparoj jam estas faritaj tiel, ke ni povas esperi, ke tiu ĉi ĝenerala kunveno de aŭstriaj esperantistoj, kvankam ĝi estos la unua post eksplodo de l' mondmilito, fariĝos sufiĉe solena kaj efika. Nun estas la tempo, en kiu temas pri pli bona kaj pli ĝenerala propagando de Esperanto en nia tuta respubliko, temas pri la preparo de fina oficialigo de Esperanto en Aŭstrio. Do estas honora devo de ĉiu aŭstria esperantisto, kiu ne estas grave malhelpata, ke li venu kaj kunhelpu.

La programo estas klare fiksita kaj jam publikigita en la lasta numero. La solena malfermo okazos laŭ afabla konsento de la urbestraro en la ĉefsalono de la urbdomo. La landestro, Dr. Franz Rehrl, afable akceptis la protektoraton. Multaj eminentuloj de la urbo ĉeestos. Ankaŭ alilandaj samideanoj jam anoncis sian partoprenon. La propagandvespero, por kiu oni varbos per artikoloj en niaj jurnaloj kaj per specialaj afiŝoj, okazos en la bela Wienersaal de Mozarteum, kiun ni jam luis per kontrakto. Kongresinsignoj, kongreskartoj, honorkartoj kaj programoj estas jam presataj. Referatojn, paroladojn, amuzajn prezentadojn oni jam preparas. Do necesas nur, ke vi venu kaj kunhelpu. Ĝis nun anoncis sin el Aŭstrio proksimume 60 samideanoj, sed nepre devos veni pli, sed ili hezitas ankoraŭ. Vi multe helpas al la bona organizo, se vi baldaŭ vin anoncas. Precipe, se vi volas, ke ni prizorgu al vi taŭgan loĝejon, vi nepre devas vin anonci antaŭ fino de julio, ĉar alie ni ne povas garantii al vi loĝejon. Jam nun estas multaj gastoj en la urbo kaj oni streĉe laboras por konstrui la novan domon por festludoj, kiuj okazos tuj post nia kongreso. Meteorologia profeto jam antaŭdiris, ke je la tagoj de nia kongreso verŝajne estos bela vetero. Do ne timu! Ni ankaŭ klopodos, ke vi ĉi tie ne havos eksterordinare grandajn monelspezojn. Do se via financa stato ne estas tro malbona, vi sen timo povas riski la aliĝon.

P r i p e n s u k a j a g u t u j !

Vi certe ne pentos. Plenigu la aliĝilon, aŭ se vi ne havas, skribu sur poŝtkarto vian adreson kaj dezirojn pri loĝejo kaj sendu ĝin al „Esperanto-Kongreso Elisabethstrasse 17, Salzburg".

Se vi volas, ke Esperanto pli rapide disvastiĝu en Aŭstrio, se vi volas, ke Esperanto baldaŭ venku, aliĝu, varbu aliajn kaj venu! Aktiva kunhelpo montras la bonan volon.

L. K. K. de la Va.



Kastelo Hellbrunn.

PROGRAMO DE LA Va TUTAŬSTRIA ESPERANTO-KONGRESO

8., 9., 10. aŭgusto 1925 en Salzburg.

Sabate je la 20a: Salut-kaj interkonatiĝvespero en „Wolf-Dietrich“.
Dimanĉe je la 9a: En la salono de l'urbdomo prepara kunveno de A. E. D.-prezidantaro.
je la 10a: Solena malfermo de la Kongreso en la salono de l'urba domo (speciala programo).
je la 14a: A. E. D.-kunveno, preparo de la ĉeflaborkunsido en la salono de Wolf-Dietrich.
je la 16a: Forveturo per tramo al la belega kastelo Hellbrunn.
je la 20a: Amuza vespero en Wolf-Dietrich (speciala programo).
Lunde je la 9a: A. E. D.-kunveno por prepari la tagordon.
je la 10a: Ĉeflaborkunsido en la salono de Wolf-Dietrich. Referatoj, diskuto, proponoj, decidoj.
je la 14a: Daŭrigo kaj fino de la ĉeflaborkunsido.
je la 20a: Propagandvespero publika kun honorgastoj en Wienersaal de Mozarteum.



**Königsee,
kien ekskursos
la kongresanaro.**

AĈETONTOJ PREFERU JENAJN REKOMENDINDAJN FIRMOJN ESPERANTEMAJN!

Bona kafo: Kafejo „Glockenspiel“, Mozartplatz.
Ĉokoladoj kaj sukeraĵoj: B. Rajsigl, fabriko, Vierthalerstr. 14—16, vendejo: Dreifaltigkeitsg. 9.
Manĝaĵoj por vojaĝo: Stranz & Scio en la naskiĝdomo de Mozart, Getreidegasse.
Bonaj sudfruktoj: A. Wegner, Residenzplatz.
Belaj memoraĵoj kaj specialaĵoj de Salzburg: Th. Hattinger, Bismarkstr. 12.
Ludiloj kaj ŝercaĵoj: Neumüller, Rathausplatz.
Brosoj, kombiloj ktp: J. Altenaichinger, Linzerg. 6.
Gantoj: Sperl, Rathausplatz.
Turist-bezonaĵoj ĉefe pluvmanteloj: L. Haas, Platzl 2.

Vestajoj ĉiuspecaj: S. Schwarz, Ludwig Viktorplatz.
Modernaj kaj sportvestajoj por sinjoroj: Wilh. Slama („Zum Edelweiß"), Ludwig Viktorplatz 8.
Bezonajoj por turistoj kaj kajakveturantoj: Herm. Amanshauser, Residenzplatz 7.
Metalajoj: Grandvendejo K. Steiner. A. G.
Paper-, skrib- kaj desegnad-bezonajoj: Hackenbuchner. Getreidegasse.
Apoteko: H. Hinterhuber, Linzergasse 7 (Vicdel. de U. E. A.).

E.-Kongresoj okazos:

19.—21. VII. Bulgara en Sofio.
31. VII. — 7. VIII. Somera Universitato Internacia en Genève.
1. VIII. Antaŭ-kongreso en Bern.
2.—7. VIII. Universala XVIIa en Genève.
8.—10. VIII. **Va Aŭstria en Salzburg.**
11.—15. VIII. **Va Semnacia en Wien.**
13.—16. VIII. Xa Katolika en Paris.

LA XVIIa UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO KAJ SOMERA UNIVERSITATO INTERNACIA EN ĜENEVO.

Provizora programo.

Vendredon, 31. julio:

Vesp.: Malfermo de la Somera Esperanto-Universitato en la Geneva Universitato. Prelego de S-ro Won Henn pri la penso de Konfucio. — Alparoloj de la Rektoro kaj universitataj profesoroj.

Sabaton, 1. aŭgusto:

Mat.: Kursoj kaj prelegoj.
Ptm.: Vizito al la Ligo de Nacioj.
Vesp.: Interkonatiĝa vespero.

Dimanĉon, 2. aŭgusto:

Mat.: Diservoj, katolika en Notre-Dame, prediko de Pastro Carolfi; protestanta, prediko de S-ino Margaret Blaise kaj Rud. Horner; hebrea (detaloj sekvos); kunveno de framasonoj.
Ptm.: Gardenfesto koncerta. — Kunsido de K. R.
Vesp. 8·15: Solena malfermo de la kongreso en Viktoria-Hall.

Lundon, 3. aŭgusto:

Mat.: Kursoj kaj Prelegoj, Fakoj, Kunsidoj de C. K., K. R., UEA.
Ptm.: Ekskurso en ŝipo sur la Lago Geneva.
Nokte: Balo en naciaj kostumoj. — La C. K. oficiale akceptos ĉiujn kongresanojn individue ĉe la eniro.

Mardon, 4. aŭgusto:

Mat.: Kursoj, Prelegoj, Fakoj, Kunsido de K. R. kaj UEA kun C. K.
Ptm.: Promenado, Fakoj.
Vesp.: Generala kunsido de la kongreso. Raportoj de l' Akademio, C. K. kaj UEA.

Merkredon, 5. aŭgusto:

Mat: Kursoj, Prelegoj, Fakoj, Kunsido de la Komitatoj.
Ptm.: Ekskursoj. — Fakoj.
Vesp: Teatra prezento de „Ginevra", lirika dramo, de D-ro Privat originale verkita en Esperanto, en la Urba Granda Teatro.

Jaŭdon, 6. aŭgusto:

Mat.: Kursoj, Prelegoj, Fakoj, Komitataj kunsidoj.
Ptm.: Promenado, Fakoj.
Vesp: Solena memorfesto al D-ro Zamenhof en Viktoria-Hall.

Vendredon, 7. aŭgusto:

Mat.: Eventuala ferma kunsido, se oni ne povis jam fermi jaŭdon vespere.

Va KONGRESO DE S. A. T.

Wien 11.—15. aŭgusto 1925

en la hejmo por popolklerigado en la XVIa distrikto.

Ĉiuj proletarioj, membroj de S. A. T. kaj nemembroj simpatiantaj, nepre aliĝu la kongreson kaj partoprenu. La malalta kongreskotizo (aŭ. Ŝ. 2.—, por senlaboruloj post atestita senlaboreco la duono) donas al ĉiuj la eblon aliĝi.

Kongresadreso: Josef Slezak, Wien, XX., Ospelgasse 34/25.

Lingva Komitato

pligrandiĝis je 5 novaj membroj elektitaj en la lasta tempo: S-ro Behrendt (98 voĉoj el 92), S-ro de Lajarte (88), S-ro Tellini (86), F-ino Zschepank (81), S-ro Kastner (78).

Akademio

estis kompletigita per elekto de la jenaj ses membroj: Christaller (78 voĉoj), Warden (72), Nylén (67), Isbrücker (65), Bailey (47) kaj Migliorini (47).

LA RATOKAPTISTO DE KORNEŬBURG.

El la broŝuro: „Popollegendoj el Malsupra Aŭstrio“, elektitaj kaj prilaboritaj de Friedrich Kuthmayer. (Volksschatz Nr 52 – 53), Deutscher Verlag für Jugend und Volk, Wien I., Burgring 9.

Antaŭ kelkcent jaroj la Donaŭ-urbeto Korneŭburg estis vizitata de granda turmento. En ĉiu domo, ja en ĉiu ejo estis nenombreblaj ratoj kaj ili plimultiĝis dum mallonga tempo tiom, ke ili venis sur la manĝotablojn kaj eĉ en la kuŝejojn de la homoj. Ĉiuj rimedoj por forigi la malagrablajn gastojn estis vanaj.

Jen la konsilantaro de la urbo sciigis ĉie, ke ĝi destinos la altan premion da mil guldenoj por tiu, kiu liberigos la urbon por ĉiam de la malbonaĵo. Kelkaj tagoj estis pasintaj, kiam anoncis sin ĉe la urbestro fremda viro strange aspektanta. Li surhavis kamizolon el diverskoloraj ŝtofoj, ĉapon kun tri longaj plumoj balanciĝantaj konstante supren kaj malsupren kaj ĉe la flanko li havis ledan poŝon sur longa rimeno. Li demandis la urbestron, ĉu la afero pri la promesita premio estas ĝusta, kaj kiam la urbestro respondis jese — kvankam kun kelkaj se- kaj sed-eldiroj — la fremdulo diris, ke li volas provi sian bonŝancon. Tuj li iris antaŭ la urban domon, prenis nigran fajfileton el sia leda poŝo kaj ektaifis per ĝi. Estis teruraj tonaĉoj, kiujn li aŭdigis.

Sed la stranga muziko havis efikegon. Densare la ratoj alkuris el ĉiuj domoj kaj amasiĝis je vera monto tiel, ke aspektis, kvazaŭ grandega nigra vermo alrampus. La fremdulo senĉese blovante siajn terurajn melodiojn paŝis al Donaŭ. Malantaŭ li la vivanta ratmonto ŝoviĝis tra la stratoj. Nun la ratforloginto venis al la bordo de la riverego, iris sen hezito kelkajn paŝojn en la akvon kaj ekstaris. En la sama momento la tuta armeo da ratoj kuregis laŭ- kaj kontraŭflue al la akvo kaj saltis en ĝin. Grandega nigra makulo kovris la suprajon de Donaŭ kaj, kaptita de la fluo, ĝi estis kunfluigata. Eĉ ne unu sola rato plu estis videbla sur la bordo.

Grandega popolamaso observis la spektaklon kaj nun aklamis la foriginton de la ratoj. Plenfiere li iris en la mezo de multaj centoj al la urba domo, por ricevi sian rekompencon. Sed la urbestro akceptis lin kun malafabla mieno kaj diris opinie al li, ke la sukceso eble ne estos daŭra, ĉar povus ja tamen okazi, ke oni denove estos surprizata de tiuj bestoj. Kiam la fremdulo kontraŭdiris, la urbestro rediris: „Nu, kvincent guldenojn mi ja volas elspezi.“ La ratkaptisto persistis je sia rajto kaj postulis sian rekompencon duan fojon. La urbopatro ĉagrenita per tio donis al la fremdulo saketon kun kvincent guldenoj kaj montris al li, kie estas la pordo. La ratkaptinto ekkoleris, jetis la monon antaŭ la piedojn de la urboreprezentanto kaj murmurante teruran blasfemon li foriris kun malserena mieno.

Post kelkaj semajnoj la Korneŭburganoj aŭdis strangan muzikon. Estis la ratforloginto, kiu denove iris tra la stratoj. Sed ĉi tiun fojon li blovis mirinde dolĉe, tiom dolĉe, ke tio allogis kaj altiris la infanojn por sekvi lin. La aro pli kaj pli grandiĝis, grandaj kaj malgrandaj alkuris saltante kaj ĝojkriante. Sur la sama vojo — kiel tiam — la ratkaptisto paŝis al Donaŭ kaj irinte en la akvon li suriris ŝipon ornamitan per multkoloraj flagoj kaj rubandoj, kiu jam atendis la gastojn. Senhalte la infanoj

Ratokaptisto sur urba puto

paŝetis post li tra la akvo kaj, kiam la lasta estis sur la ŝipo, ĉi tiu estis ekremita for de la bordo rapidege laŭfluen. La homoj serĉante poste siajn infanojn nenie trovis post-signon de ili.

Nur unu surda estis restinta kaj dua, kiu ankoraŭ kuris por preni sian jaketon, sed poste jam ne povis atingi la aron. Tiam estis nepriskribebla plendado kaj ĝemado en la urbo, ĉar la venĝo de la trompita ratkaptinto preskaŭ ne indulgis unu familion. Memorŝtono en la paroĥeja strateto en Korneŭburg memorigas ankoraŭ nuntempe je ĉi tiu okazaĵo.

Esp.-igis Berta Betzwar.

VI ĜIS NUN NE PAGIS

la kompletigan sumon al via „A. E.“-abono por aŭgusto ĝis jarfino.

Aŭstrianoj: aŭ. Ŝ. 1.30;
Germanlandanoj: g. or.-M. 1.—;
alilandanoj: sv. Fr. 1.50 aŭ egalvaloro.

Bonvolu tuj alsendi ĝin, por ne kaŭzi interrompon de la alsendo.

LA AKVOENERGIA ELEKTREJO EN TEIGITSCH-ARNSTEIN.

La 28. de marto 1925 estis granda festotago por tuta Stirio. En ĉeesto de l' prezidanto de la Aŭstria respubliko, d-ro Hainisch, liga kanceliero d-ro Ramek, landestro d-ro Rintelen kaj multaj reprezentantoj de oficialaj kaj privataj organizaĵoj ktp. estis inaŭgurata la unua granda akvoenergia elektrejo en Stirio, en Teigitsch-Arnstein. La publikaj konstruaĵoj kaj la ekkonilo de Graz, la horloĝturo sur Schloßberg, estis iluminataj vespere kaj disigis malproksimen tra la lando la sciigon pri la venko de pacaj batalantoj por la progreso kaj prospero de „verda Stirio“!

Ĉiuj febroj, krizoj kaj tumultoj, kiuj en la postmilita tempo skuis la malvenkintajn landojn, trafis ankaŭ Stirion. Des pli admirinde estis, ke en tiu epoko de ĝenerala malespero kaj necerteco estis kelkaj kuraĝaj homoj, kiuj ellaboris projekton plej gravan por la industrio kaj ekonomio de Stirio — grandiozan planon por la utiligo de l' akvoenergio. La elmontegaraj riveroj kaj rivereto en Stirio estas rapide fluantaj kaj povas sendependigi la tutan enlandan industrion de l' importo de aliaj energifontaĵoj (karbo ktp.), ja, tiuj rivereto povas eĉ provizi la najbarajn landojn per energio.

Ĉi tiu projekto, kies kreinto estas inĝ. Hofbauer, estis grandioza kaj ĝia plena realigo malfermos al la lando ĝis nun ne supozitajn fontojn de riĉeco. La nefleksebla volo de inĝ. Hofbauer atingis ankaŭ la realigon de sia projekto. Li sciis interesigi la gazetistaron kaj oficialulojn kaj en 1921 estis fondata „Steweag“ (Steirische Wasserkraft- u. Elektrizitäts-A. G., t. e. Stiria akvoenergio- kaj elektrosocieto akcia) sub la prezido de landestro d-ro Rintelen. Ĉefdirektoro estiĝis inĝ. Hofbauer.

Tuj poste komencis la preparaj laboroj; inĝenieroj mezuris kaj desegnis en la senvojaj regionoj apud Teigitschrivereto (elp. Tajgič), en la oficejoj estis kalkulataj la maŝinoj, kaj la plej grava laboro — la mobilizo de la necesaj monsumoj — estis farata de la landestro d-ro Rintelen mem.

Liaj influo kaj energio povis venki la krizon, kiu ankaŭ minacis la socieon dum la periodo de l' granda inflacio en somero 1922.

La pliboniĝinta ekonomia situo kaj la bona vetero en la jaro 1923 tre favoris la progreson de la laboroj. Je la fino de tiu jaro oni estis konstruanta jam la kluzon, maŝinojn, ŝaltejon, tensiŝanĝejon en Graz-sudo; ankaŭ la laboroj ĉe la akvokonduka tunelo bone prosperis. Je la fino de 1923 d-ro Rintelen kaj inĝ. Hofbauer sukcesis certigi la financan bazon de „Steweag“ per partoprenigo de kapitalista grupo itala. Komence de 1924 estis komencataj la instalo de l' tensiŝanĝejo en Graz-sudo kaj la konstruo de alttensia kondukilo de Arnstein al Graz. La 10. de majo

1924 la prezidanto de la respubliko ĉeestis la lastan trabaton de la tunelo.

Fine de 1924 la tuta elektrejo estis plejparte preta. La provoj, faritaj inter decembro 1924 kaj marto 1925, pruvis la plenan taŭgecon de ĉiuj instalaĵoj.

La laboroj estis farataj preskaŭ ekskluzive de enlandaj entreprenoj. La ĉefaj partoj de la tuta elektrejo estas jenaj:

La akvokolektujo. Ĝi kolektas kvanton da pli ol 300.000 kubmetroj da akvo kaj estas barata de la kluzo Langmann, malfermota nur en okazo de inundodanĝero kaj por purigi la kluzon; 85 metrojn larĝa; ĝiaj betonaj muroj bazas 9 m sub kaj altiĝas 17 m super la valfundon.

La akvotunelo kondukas tra gnejsa montaro kaj estas pli ol 5000 m longa kaj betonumita por hermetikigi ĝin.

La premakvokondukilo estas 700 m longa. 1000 tunoj da fero estas uzataj en formo de ladaj tuboj vinktitaj, 10—28 mm dikaj kun diametro de 1500—1970 mm, por kontraŭstari internan akvopremon de 3—25 atmosferoj. La klino de l' kondukilo estas komence 19—36%, en la lasta triono ĝis pli ol 50%.

La uzino Arnstein. Ĝia ekstera arĥitektura formo plene akordiĝas al la karaktero de l' pejzaĝo. Maŝinejo, direktilejo, ŝaltejo estas kunigitaj en ĝi. La turbino efikas 15.000 ĉ. f. je 5·5 m³/sek. englutkapablo kaj 750 turniĝoj po minuto. La elektrofarilo estas pro sia efiko da 1300 kiloŭatoj la plej forta maŝino de la aŭstriaj akvoelektrejoj. La ricevata elektra energio havas ĉe 50 periodoj po sekundo 5500 voltojn. La maŝino pezas 75.000 kilogramojn.

La malproksimkondukilo de Arnstein al Graz. Ĉi tiu unua stiria grandkondukilo por 60.000 voltoj estas 28·6 km longa kaj havas kuprodratojn po 70 mm². 140 feraj, en betono fundamentitaj mastoj portas ĉe meza distanco de 200 m entute 53.000 kg da kuprodratoj.

La tensiŝanĝejo apud Graz estas la mezostiria centro de ekzistantaj kaj ekzistontaj elektrovojoj el ĉiuj mondodirektoj kaj fludisigejo por la urbo Graz. La „altvolt"-ejo peras la al- kaj forfluon de kvin 60.000-voltaj fluoj; en la „malaltvolt"-ejo estas sanĝata la fluo al 20.000 voltoj (por malproksimkondukiloj) kaj al 5000 voltoj por la urbo Graz.

La unua etapo de grandioza projekto estas realigita. Kaj jam komencis la laboroj por la dua akvoelektrejo apud rivero Mur sude de Bruck.

Stirio kaj kun ĝi tuta Aŭstrio fieras pri tia sukceso, kiu montras, ke la stiria popolo, malgraŭ ĉiaj malfacilaĵoj, partoprenas je la ekonomia resanigo de Aŭstrio kaj de Eŭropo

Laŭ broŝuro kun permeso de „Steweag" verkis Josef Mader-Graz.

LA ŜANCOJ DE LA DANZIG-A AŬTUNA FOIRO.

La Esperanto-Fako de la Danzig-a Foiro sciigas al ni jenan: Malgraŭ la malfacila ekonomia situacio en la tuta mondo la aliĝoj al la proksimiĝanta Danzig-a Aŭtuna Foiro alvenas jam multnombre. La Danzig-a Foiro ree donos interesan superrigardon pri la ampleksa var-oferto. La komercaj rilatoj inter la Polujo kaj Germanujo estas ja iomete malcertaj kaŭze de la nur malrapide progresantaj komercaj traktatoj, sed oni supozas ke en aŭtuno de kuranta jaro la konvencio inter Polujo kaj Germanujo estos certe farata, ĉar ambaŭ ŝtatoj estas plej multe interesata pri komerca alproksimiĝo. La viva intereso, kiun Ruslando montras por la Danzig-a Foiro, estas tre ĝojiga. Aliĝis jam kelkaj ŝtataj aĉet-organizoj. Sekve estas grave por ĉiuj industrioj, ke ili nepre ekspozas en Danzig, ĉar ne nur Polujo kaj Ruslando, sed ankaŭ la Baltikaj ŝtatoj Skandinavujo kaj Finlando aĉetos okaze de la Danzig-a Foiro. Oni estas konstruanta grandan foirhalon por la teknikaj industrioj kiu certe estos preta, kiam okaziĝos la IVa Danzig-a Internacia Foiro de la 6a ĝis la 9a de aŭgusto.

La Esperanto Fako de la Danzig-a Foiro estos je la dispono de la diversnaciaj reprezentantoj por plifaciligi la negocojn.

Aŭstruja Esperanto-Delegitaro

Bisamberg bei Wien Nr. 248.

ESPERANTO ĈE LA AŬSTRIAJ FERVOJOJ.

En lasta momento antaŭ apero de la junio-numero de „A. E.“ mi sciiĝis, ke la ĝeneraldirekcio de Aŭstriaj liglandaj fervojoj favore akceptis nian proponon koncerne enketon pri E.- en la vicoj de siaj oficistoj kaj salajratoj. Mi nur havis la tempon publikigi la leteron de la ĝeneraldirekcio sen rimarkoj, kiuj — ĉar la afero estas sufiĉe grava — necesas kaj nun sekvos.

Certe multaj gesamideanoj ne pripensis, kion signifas tiu letero por nia movado en Aŭstrio!

Laŭ tiu letero la Generaldirekcio ordonis (Akt-nro 53532/25 G. D.) al la submetitaj fervojdirekcioj (t. e. Wien-Nordost, Wien-Südwest, Linz, Innsbruck kaj Villach), raporti pri la nombroj de al ili submetitaj dungitoj, kiuj

1. scipovas E-on,
2. nuntempe lernas la lingvon,
3. volas lerni en aŭtuno de l'nuna jaro.

Laŭ tiu ĉi ordono ĉiu direkcio verkis skriban cirkuleron. Sekvas la teksto de tiu ĉi cirkulero publikigita de la Liglandfervoj-direkcio Wien Nordost:

Liglandfervoj-direkcio Wien-Nordost.

Wien, 24. junio 1925.

N-ro 2839/1
Koncerno: Esperanto.

Cirkulero al ĉiuj servlokoj.

Por raporto al la ĝeneraldirekcio ni bezonas la nombron de tiuj dungitoj, kiuj

1. scipovas E.-on,
2. nuntempe lernas la lingvon
3. volas lerni en aŭtuno de l' nuna jaro.

Prezentu la koncernajn raportojn al la sekretariejo, grupo 2, ĝis 10. julio. Se neniu estos anoncinta sin, sendu ankaŭ sciigon pri tio.

De la Liglandfervoj-direkcio.

Tiun ĉi cirkuleron ricevis ĉiuj servlokoj (oficejoj de la direkcio, stacioj, haltejoj, laborejoj por konstruo kaj riparo de lokomotivoj kaj vagonoj, hejtigejoj kaj ties laborejoj, oficejoj por prizorgo de la relaro ktp.)

Grava en tiu ĉi cirkulero ankaŭ estas la punkto pri raporto ĉiuokaza, ankaŭ se neniu sin anoncis.

Tiel ĉiuj estroj (ĉu amikoj de E. aŭ ne) devos plenumi tiun ĉi ordonon.

Cu vi scias, kara legantaro, kiom da homoj per tiu al E. favora ordono de la ĝen.-dir. ne nur estis simple atentigataj al Esp., sed ankaŭ al la cirkonstanco, ke ilia plej supera instanco favoras ĝin?

Vi sciu, ke en la servoj de la Liglandaj fervojoj nun estas proksimume 90.000 dungitoj, el kiuj 70% estas edziĝintaj. Se oni nur kalkulas po edziĝinta fervojisto du infanojn, ni ricevas proksimume 300.000 personojn, el kiuj granda parto verŝajne per tiu ĉi cirkulero **unuan fojon** aŭdis ion pri E.

La tuta Aŭstria respubliko nuntempe havas 6 milionojn da enloĝantoj. Tial 5%, aŭ la dudeka parto, de la aŭstria enloĝantaro sciiĝis per helpo de la ĝen.-dir. de liglandaj fervojoj pri Esperanto.

Per tiu ĉi faro la ĝeneraldirekcio de aŭst. liglandaj fervojoj meritigis sin je la plej sincera danko de la Esperantistaro.

Hugo Steiner,
ĝen.-sekr. de Aŭstria Esp.-Delegitaro.

D-ro Henriko Haas, advokato el Maribor (S. H. S.) mortis la 30. junio en la hospitalo de la „Kompatemaj fratoj“ en Graz.

Estinte prezidanto de la iama loka grupo de „Esperanto-societo por Stirio“ en Maribor la mortinto estis pioniro de nia movado en la nun jugoslava suda Stirio.

Li ofte partoprenis niajn kunvenojn en Graz, ankaŭ post la permilita disŝiro de nia Stirio.

Nia societo perdas per lia foriro malnovan amikon kaj la grupo en Maribor plej valoran apogon.

Ni ĉiam memoru je li en dankemo kaj respekto. Esperanto-societo por Stirio.

Rogler.

GRANDSTILA ESPERANTO-PROPAGANDO PER AFIŜOJ EN STACIDOMOJ.

Jam de longa tempo E.-istoj prave deziras uzi tiun ĉi rimedon precipe efikan. Ne nur por diskonigi nian aferon taŭgas tiaj publikaj anonciloj. Vojaĝantaj samideanoj ofte povus rapide informi sin ĉe alveno en stacio pri renkontebloj kun samlokaj E.-istoj.

Pro tio la ĝenerala sekretario de A. E. D., s-ro Steiner, interrilatigis sin al Österr. Verkehrswerbungsgesellschaft, ĉar tiu ĉi societo havas la solan rajton por plakatado en stacioj.

Per letero de 2. julio la entrepreno sciigis s-on Steiner, ke „konsiderante la publike utilan celon“ ĝi havigas al la Esperanto-Unuiĝoj por la intencita anoncado sur stacioj de la aŭstriaj fervojoj rabaton je sia tarifo. Al energia persona petado de s-ro Steiner ni dankas la pluan avantaĝon, ke la diverslokaj grupoj ricevis la permeson, fiksi mem-disponigotajn tabulojn. Tio kompreneble krome ŝparigos kostojn.

Nepre necese estas, ke nun granda nombro da grupoj sciigu s-on Steiner pri sia decido, uzi tiun ĉi propagandeblon, ĉar la entrepreno kompreneble povas interrilati kun nur unu persono.

La anoncletero enhavu:

1. nomon kaj precizan adreson de la respondeca mendanto (pagonto!) kaj stampon;
2. nomon de la stacidomo;
3. formaton de la dezirata anonctabulo;
4. materialon (ferlado aŭ ligno);
5. tekston de la anonco.

Konsiderante la multajn necesajn preparlaborojn en la centro bonvolu

ĝis la 15. aŭgusto

sendi la mendleteron kaj la monsumon plus 50 gr por aranĝelspezoj al s-ro Steiner Hugo, Bisamberg 248. La 1. septembro komencu la fiksado de la tabuloj.

La bezonataj preparoj por Wien estos farataj de la estraro de E. D. W. Decido en septembra kunsido.

La formatoj kaj pojaraj prezoj estas jenaj:

34 × 42 cm po peco . . . . Ŝ 4.—
47 × 63 „ „ „ . . . . . „ 5.—
63 × 95 „ „ „ . . . . . „ 7·50

kvankam la normala prezo por ĉiuj estus 25 Ŝ.

Ni proponas jenan komunan formon por ĉiuj:

★

ESPERANTO

UEA delegito: (nomo kaj adreso)

Grupo: (nomo, ejo kun adreso, kunventago kaj horo)

Mi ne dubas, ke la Esperantistaro plene rekonos la gravecon de la servo, kiun faris al ni Öst. Verkehrswerbungsgesellschaft. Estus dezirinde, ke ĉiu inter ni laŭeble helpu reciproke la entreprenon, rekomendante ĝin al klientoj.

Ĝi peras la publikigon de ĉiuspecaj negocanoncoj ĉe fervojoj kaj ŝipkompanioj, reklamojn sur veturbiletoj, plakatojn en ĉiuj iom grandaj urboj de en-kaj eksterlando, tien ankaŭ anoncojn por ĉiuj gazetoj kaj fakjurnaloj, la efektivigon de kompletaj propagandoplanoj por la tuta mondo, projektojn kaj efektivigon de ĉiuspecaj reklamiloj, lumreklamilojn en la stacidomoj, eldonon kaj disvastigon de presaĵoj kaj grafikaĵoj.

Nian precipan dankon meritas la ĝen.-sekr. de A. E. D. pro la penkaŭziga havigo de tiuj efikaj propagandiloj.

Walter Smital, prezid.
de E.-Delegitaro-Wien.

Raportis pri Esperanto!

„**Gemeindewoche**“ en Korneuburg, 3. VII. 1925.

„**Kremser Zeitung**“ en Krems, 18. VI. 1925.

„**Unser Heim**“ en Traiskirchen (Liglanda edukejo) en n-ro 6.

„**Der städtische Angestellte**“ en Wien, 20. VI. 1925.

Novaj gazetoj:

„**Homeco**“, duonmonata internacia literatura Esp.-Revuo. Redakt. Pastro Georgi Hristov, Popovo, Bulgario.

Esperanto-Delegitaro de Wien

Wien, XXI., Am Spitz 14.

Kurso por preparo al la ŝtata ekzameno pri Esperanto.

Komence de septembro oni intencas instali kurson por gesamideanoj partoprenontaj la ŝtatan ekzamenon pri instrukapablo.

Personoj, kiuj interesiĝas pri ĝi, bonvolu plej baldaŭ anonci sin al „Danubio“ Wien, VII., Lerchenfelderstraße 23.

Bohema Klubo Esperantista en Wien funebras pro morto de sia fervora samideanino

fraŭlino Anna Simanková,

kiu estiĝis bedaŭrinda viktimo de kruela akcidento.

Al la gefamilianoj ni esprimas plej profundan kondolencon.

Esperanto-Delegitaro de Wien.

La E.-sekcio de la turista unuiĝo „La naturamikoj“ aranĝos la jenajn ekskursojn:

26. VII. propaganda al Bratislava per aparta ŝipo, dungita de la societo „Bildungshort“. Forveturo 6·20 de Praterquai, alveno en Bratislava 8·40, reveturo 16 h, alveno en Wien 22 h.

2. VIII. al Mauer — Julienturm — Rodaŭn. Kunv. 7·30 en Mauer. Gvid. Ad. Müller.

9. VIII. al Mödling—Hinterbrühl—Anninger—Einöd—Baden. Kunv. 8·30 ĉe Südbahnhof. Gvid. Arn. Pick.

16. VIII. al Füllenberg. Kunv. ĉe Südbahnhof. Gvid. s-ino St. Müller.

23. VIII. Vagado. Kunv. 7·50 ĉe finstacio Nußdorf. Gvid. Wárkány.

30. VIII. al Eisernes Tor. Kunv. 7·00 ĉe Südbahnhof. Veturado al Vöslau. Gvid. Bubetz.

RADIO
BICIKLOJ KAJ
KUDROMAŜINOJ
PICK-WIEN
Centra magaz.: IX, Liechtensteinstr. 27
Filioj: IV, Wiedner Hauptstraße 10 kaj
VI, Gumpendorferstraße 67.
Oni parolas Esperante!

Ĝardenvarmejo likvidota.

Je malaltigitaj prezoj tuj en la loko vendeblaj:

precipe rodendro—arbetaĵoj,
laŭracoj altaj,
kamelioj kaj aliaj arbetaĵoj.

Gartenamt Stift Zwettl, N.-Ö.

BADEN BEI WIEN
(AŬSTRIO).

Internacia famkonata kuracloko.
Plej agrabla restadejo
kun belega ĉirkaŭaĵo.
Atingebla de Wien en 35 min. per potage proksimume 100 trajnoj de vapor- kaj elektro-fervojoj.

4 sanigejoj, 1 kuracejo por la meza socia klaso kaj 1 por infanoj, 41 grandaj hoteloj kaj pensionoj, multnombraj gastejoj, urba kuracohotelo „Herzogshof“ kun mineralakvaj banoj en la sama domo.

La mondkonataj sulfurbanoj!
Ŝlimenpakoj.
Loĝejoj kaj nutrado je ĉiuj prezoj.
Trotkonkuroj de ĉevaloj.
Somerareno (subĉiela scenejo).
Veturadoj per aŭtomobiloj kaj motorbicikloj!
Arte altranga urba teatro.
Unuaranga kuracloka orkestro.
Kelkaj kinematografaj teatroj
kun ĉiam ŝanĝata bonega programo.
Elektra tramvojo.

Informoj ĉe:
Kurkommission en Baden bei Wien.
Telef.: Baden n-ro 243.

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Hugo Steiner, Korneuburg, Hovengasse 12). — Presejo: Gesellschafts-Buchdruckerei Brüder Hollinek, Wien III, Steingasse 25.